

Heinrich Heine,
Teksista kanto

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe siaj teksiloj la dentojn
grincante
Sidadas teksistoj jen, ne plorante:
Ni teksas trioblan malbenon
por vi
En vian morttukon, Germani'.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi surda Dio,
Infane ni kredis je la religio.
Ja vane esperis, atendis ni,
Simiumis kaj mistifikis nin
Li.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu fireĝ' de l'
riĉuloj,
Kiu ne kompatis je ni mizeruloj,
Ĉantaĝas la lastajn groŝojn el
ni,
Kiel hundojn nin pafmortigas li.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al tiu ĉi falsa patrio,
Kie nur prosperas la koterio,
Kie estas rompata ĉiu juna
flor',³
Kie regas de l' putro la odor'
-
Ni teksas, ni teksas!

...

Heinrich Heine,
Die schlesischen Weber

tradukita de Alfred Conzeth

Im düstern Auge keine Träne,
Sie sitzen am Webstuhl und fletschen die Zähne:
Deutschland, wir weben dein Leichentuch,
Wir weben hinein den dreifachen Fluch.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem Gotte, dem blinden, dem tauben,
Zu dem wir gebetet mit kindlichem Glauben.
Wir haben vergeblich gehofft und geharrt,
Er hat uns geäfft und gefoppt und genarrt.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem König, dem König der Reichen,
Den unser Elend nicht konnte erweichen,
Der uns den letzten Groschen erpreßt
Und uns wie Hunde erschießen läßt.
Wir weben, wir weben!

Ein Fluch dem falschen Vaterlande,
Wo nur gedeihen Trug und Schande,
Wo jede Blume früh geknickt,
Wo Fäulnis und Moder den Wurm erquickt -
Wir weben, wir weben!

...

Heinrich Heine,
Teksista kanto

tradukita de Alfred Conzeth

Nenia larmeto en sombraj okuloj,
Jen sidas teksistoj, mizeraj povruloj;
Germana Praregno, morttukon ni teksas,
Kaj en ĝin trioblan malbenon ni plektas.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Dio, la blinda, la surda,
Al kiu ni preĝis en kredo absurda.
Ni vane esperis, ni vane predikis -
Li trompis simie, nin eĉ mistifikis.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al Reĝo, al reĝ' de riĉuloj,
Ne vidas suferon de ni mizeruloj,
Li premas el ni ja la lastan et-pundon
Kaj lasas mortigi nin kiel fi-hundon.
Ni teksas, ni teksas!

Malbenon al nia Patrujo maljusta,
Jen kie prosperas nur trompo embuska,
Jen kie ĉe putro nur morta kaduko;
Germana Praregno, jen via mort-tuko!
Ni teksas, ni teksas!

...

³aŭ: Kie frue rompatas ĉiu flor',

Navedo flugas kaj krakas tek-
sil',
Ni teksas senlace dum nokta
trankvil' –
Morttukon ni teksas, Germa-
nujo, por vi,⁴
Entekas trioblan malbenon
ni,
Ni teksas, ni teksas!

*Traduko de la Germana poe-
mo "Die schlesischen Weber"
de HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17) en Esperan-
ton de MANFREDO RATISLAVO
(Manfred Retzlaff, Stettiner Str.
16, D-59302 Oelde, Germanio,
1938-11-04).

Arg-243-491 (2005-11-20
18:13:42)

*Esperantigita de Manfredo Ra-
tislavo (Manfred Retzlaff) en
2001-04-08 laŭ la germanaling-
va teksto, kiu post la publikigo
de la unua versio en la revuo
"Vorwärts!" (= "Antaŭen!"), el-
donita de germanaj fuĝintoj,
estis diskonigita en Germanio
sur flugfolioj. En tiu flugfolia
versio la poemo havis la titolon
"Weberlied" (= "Teksista kan-
to"). [Laŭ interreta informo de
l' 27.05.04 de la Instituto Hein-
rich Heine, Düsseldorf, s-ino
Marianne Tilch.]*

Das Schiffchen fliegt, der Web-
stuhl kracht,
Wir weben emsig Tag und Nacht
-
Altdeutschland, wir weben dein
Leichentuch,
Wir weben hinein den dreifachen
Fluch,
Wir weben, wir weben!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas HEINRICH HEINE (*1797-12-
13 – †1856-02-17).*

Arg-243-490 (2005-11-20 17:47:50)

*Deutschsprachige Fassung des Ge-
dichtes, das ursprünglich mit der
Überschrift „Die armen Weber“ in
der deutschen Emigrantenzeitschrift
„Vorwärts!“ am 10.07.1844 in Paris
veröffentlicht worden war. In dieser
Flugblattfassung hatte das Gedicht
die Überschrift „Weberlied“. [Laut
Netznachricht vom 27.05.04 des
Heinrich-Heine-Instituts Düsseldorf,
Frau Marianne Tilch.]*

*Traduko de la Germana poe-
mo "Die schlesischen Weber"
de HEINRICH HEINE (*1797-
12-13 – †1856-02-17) en Espe-
ranton de ALFRED CONZETH
(*1913-12-08 – †1998-05-16).*

Arg-243-492 (2004-06-02
21:43:47)

*Alfred Conzeth vivis en Mett-
mann ĉe la germana urbo
Düsseldorf. Li estis profe-
sia presisto kaj korektisto
ĉe la eldonejo Droste en
Düsseldorf. Li mem eldonis
Esperanto-broŝurojn kaj di-
versajn tradukojn kaj tradukis
ankaŭ mem. Li estis dum multaj
jaroj la eldonisto de la infor-
milo de la Esperanto-Societo
de Düsseldorf, la "Radsaltan-
to". [Laŭ informo el la libro
"Esperanto - ein Ausweg aus
Babylon? 95 Jahre Esperanto
in Düsseldorf", eldonita en
2002 de Edeltraud kaj Max
Hans-Jürgen Mattusch kunla-
bore kun la Esperanto-Societo
Düsseldorf]*

⁴aŭ: Morttukon, ni teksas por vi, Germani',
Trioblan malbenon entekas ni.